

*ESTU KARA
LA VIVO
AL VI DONACITA*



Pripensi la cerbomorton
kaj organgrefton

Se viaj infanoj, gepatroj, gefratoj cerbe mortus...
 Ĉu vi povas, el la varma korpo tra kiu cirkulas la sango,
 elpreni la vivantan koron?



Ni ne povas agnoski la "cerbomorton/organgrefton" kiu konsistas el la ofero de ies vivo.

Enhavo - - - - Estu kara la vivo al vi donacita

- Saluto-----3
D-1: Kia estas la "leĝo pri organgrefto" aprobita la 16an de oktobro 1997?-----4
D-2: Ofte mi aŭdas la vorton "cerba morto", mi tamen ne bone komprenas; bonvolu ĝin koncize klarigi al mi.-----4
D-3: Mi aŭdis, ke patrino cerbemortinta akuŝis, ĉu estas vere?-----5
D-4: Kiel oni faras la juĝon pri cerbomorto?-----5
D-5: Kial oni ja devus, eĉ kun tia leĝo farita, determini cerbomorton la homa morto?-----6
D-6: Mi aŭdis, ke estas ankaŭ multaj voĉoj kontraŭ tio: "cerba morto" estas la morto; kial estas tiel?-----7
D-7: Mi aŭdis, ke oni en Japanio multe malfruas pri la organgrefto el la cerbemortinto, ol en aliaj landoj; ĉu estas vere tiel?-----8

- D-8:** Mi aŭdis, ke nuntempe estas multaj, kiuj atendas organgrefton, sed nun, kiam la leĝo aprobiĝis, ĉu tiuj personoj povas ĉiuj ricevi la organgrefton? Cetere, ĉu ne estas problemoj post la grefta operacio?-----9
D-9: Ĉu surloke de la urĝa kuracbezono oni povas ricevi, same kiel ĝis nun, ĉiujn kuracrimedojn?-----10
D-10: Kio estas tiel nomata "hipoterma terapio" aplikata por peza lezo ĉe cerbo?10
D-11: "DONOR"-karto (karto montri sian pretecon doni sian organon) estas diversmaniere disvastigataj; mia demando estas, kiel oni povas kontraŭagi tion?-----11
 • Ĉu oni aplikos la cerbomorton ankaŭ en la kriminala juro?-----12
 • Deziresprimado de Oomoto al la Registaro k.a. -----13
 • "NON! DONOR"-karto rekomendata----14

"Cerba morto" ne estas la morto de homo

"Leĝo pri organgrefto" estis, sen la tutnacia konsento, aprobita la 16an de oktobro 1997. Kun la aprobiĝo de la leĝo, oni decidis prijuĝi la "cerbomorton" por la grefto ĉe la homoj, kiuj vivante montris sian volon doni organon.

Ni tamen pensas, ke la "cerba morto" ne estas nomebla la vera morto.

Ankaŭ inter la kuracistoj, juristoj, estas multaj, kiuj ankoraŭ ne agnoskis cerbomorton la morto.

Universala Homama Asocio tion apelaciis grandskale al la publiko pere de gazetaro k.a., surbaze de instruoj de DEGUĈI Onisaburo, la Fondinto de UHA, ke "la morto okazas en la momento, kiam la animo deiras de la korpo"; "la animo deiras de la korpo, kiam la koro komplete ĉesas bati".

Bonvolu, ĉi-okaze, kune prilerni dignon de la "vivo".

D-1 Kia estas la "leĝo pri
organgrefto" aprobita la
16an de oktobro 1997?

R Temas pri la leĝo, laŭ kiu eblas elpreni ies organon en la cerbomorta stadio por grefti en la trian personon, kondiĉe ke la koncerna persono mem, ankoraŭ viva, elmontris skribe (per DONOR-karto, k.a.) sian volon doni organon laŭ la cerbomorta prijuĝo, kaj ke tion konsentis ties familianoj.

Ĝis nun la morto okazis kun la korbataĉeso, sed nun, kiam la leĝo aprobiĝis, naskiĝis do, aparte de la ĝisnuna morto (la morto kun tri signoj), nova morto nomata "cerba morto", sekve, ĉiu el ni devas laŭ sia volo elekti iun el la du mortoj.

**Leĝo
pri organgrefto**

La koncerna persono mem viva elmontris sian volon, kaj plie konsentis la familianoj.

Ek! al la grefto!



S-ro N.N. de la najbara ĉambro bonvolis doni organon. Kaj vi?

Via filo cerbemortis.

Du mortoj !?
Kiun el tiuj elekti ?

!?
cerba morto

La morto kun tri signoj:
La korbataĉeso
La spirĉeso
La pupildilatiĝo

D-2 Ofte mi aŭdas la vorton "cerba morto", mi tamen ne bone komprenas; bonvolu ĝin koncize klarigi al mi.

R Antaŭ ĉio pri la vorto "cerbo-morto", kiu naskiĝis apenaŭ antaŭ 30 jaroj. Pli antaŭe, ne ekzistis la vorto: "cerbomorto". Sed, kiam komenciĝis greftoj de koroj, hepatoj ktp., naskiĝis la pensmaniero, kiu ĝis tiam ne ekzistis, nome: "cerbomorto".

La cerba morto signifas la staton, en kiu ne eblas plu de ekstere detekti ĉiujn funkciojn de la cerbo (cerebro, cerebelo, cerbotrunko), kaj en kiu la funkcioj absolute ne reguliĝos denove. Ordinare, kiam daŭras dum kelke da tagoj la stato de cerbomorto, ekokazas la korbatĉeso. Tamen en la korpo de paciento rigardata kiel cerbemortinta, restas ankoraŭ la temperaturo, ankaŭ cirkulas la sango, kaj normale funkcias ankaŭ organoj krom la cerbo.

D-3 Mi aŭdis, ke patrino cerbemortinta akuŝis, ĉu estas vere?

R Estas vero. En multaj landoj de la mondo tiaj akuŝoj estas raportataj.

Oni raportis ankaŭ unu kazon, en kiu okazis akuŝo post la stato de cerba morto, kiu daŭris 106 tagojn en Usono (televide: NHK-speciala).

Ankaŭ en Japanio patrino en la stato de cerba morto propraforte akuŝis sanan bebon, kaj la infano kreskas sane. Se la cerba morto estus vere la morto mem, tiam tiuj akuŝoj el la stato de cerba morto signifus la naskiĝon de nova vivo el kadavro.

Sole ĉe la fakto de tia akuŝo, evidente montriĝas, ke cerbomorto ne estas la morto de homo: neniam el kadavro naskiĝas bebo.

La mortohoro...?
Ĉu cerbomorto? Tamen....
la koro moviĝas...



...estas la morto
Kio?... de homo...?



D-4 Kiel oni faras la juĝon pri cerbo-morto?

R Ekzistas tiel nomata kriterio prijuĝi cerbomorton nomata ankaŭ: "La kriterio de TAKEUĈI", kaj la prijuĝo estas farata laŭ tio; por plenumi la juĝon oni konstatas jenajn 5 erojn:

1. Profunda komato
2. Fiksiĝo de pupildilatigo
3. Malapero de cerbotrunka reflekso
4. Ebenaj cerboondoj
5. Malapero de spontana spirado

Post kiam pli ol du kuracistoj (escepte de la kuracistoj: kiu elprenas organon kaj kiu, uzante la organon, aplikas grefton al la tria persono) faris ekzamenon (la unuan), ĉu tiuj 5 eroj estas konstatitaj, oni faras 6 horojn poste la saman ekzamenon (la 2an), kaj en la kazo, kiam tio estas refoje konstatita, la juĝo pri "cerba morto" estas decidita.

Sed efektive, tiu kriterio naskiĝis en la jaro 1985, kaj poste nun estas multaj ankaŭ inter la fakuloj, kiuj primontras tion, ke la medicino plue progresis, tiel ke nur tiuj 5 eroj ne sufiĉas por diri, ke oni faras kompletan prijuĝon pri la cerba morto. Cetere, la tempo komenci la prijuĝon estas lasita surloke al koncerna kuracisto, estas do eble eĉ aranĝi la tempon de la morto. Pro tio povus ekesti diversaj problemoj. (Ekzemple: En tia kazo, ke patro kaj filo, kiuj konsentis, prijuĝon pri cerbomorto, trafis trafikakcidenton kaj falis samtempe en la staton de cerbomorto, ĉu la edzino de la filo havas aŭ ne la rajton pri heredo de havaĵoj decidiĝos laŭ tio, pri kiu el ambaŭ oni pli frue juĝas ties morton, ktp.)

D-5 Kial oni ja devus, eĉ kun tia leĝo farita, determini cerbomorton la homa morto?

R Kial okazis, ke nun necesas la pensmaniero je la "cerbomorto"? Tio estas por elpreni koron, hepaton k.a. el la homa korpo, en la stato de freŝa viveco, por organgrefto. Tamen, ne eblas elpreni organojn el vivanta homo. Se oni farus tion, oni ja kulpos pri murdo.

Por eviti tion, oni decidis leĝe, ke la morto de homo ekestas en la stato, kiam la homa cerbo komplete ĉesas funkcii t.e. en la stato nomata "cerbomorto". Tiam la greftkuracisto povas, tute ne akuzite pro kulpo pri murdo, elpreni legale, pro grefto, ankoraŭ vivantan freŝan koron aŭ hepaton k.s.



Cerbkirurgo

Flegistino

Juristo


D-6 Mi aŭdis, ke estas ankaŭ multaj voĉoj kontraŭ tio: "cerba morto" estas la morto; kial estas tiel?

R Tio estas, kiel ni jam respondis vin ĉe la demando :5, ĉar la "cerbomorto" estas morto elpensita de homoj oportuniste por organgrefto, kaj ĝi ne estas akceptebla de ĉiu, malkiel la ĝisnuna "morto de la korbatoĉeso". Ankaŭ laŭ la medicina vidpunkto, estas ankoraŭ forta la pensmaniero, ke la morto okazas, kiam ĉesas la cirkulo (funkcio reganta la sangcirkulon kun la centro ĉe koro), kaj ankaŭ multaj fakuloj rilatas demandsigne pri tio, ke la morto okazas sole kun la funkciado de la cerbo. Efektive, kiom videblas ankaŭ ĉe diversspecaj enketoj fare de gazetoj kaj televidstacioj k.a., preskaŭ duono de la enketitoj havas reziston kontraŭ tio, ke cerbomorto estu la morto de homo. Fojfoje ni aŭdas eldirojn, kvazaŭ tio estus fakto, ke preskaŭ ĉiuj kuracistoj agnoskas la cerbomorton, sed, kiuj pozitive aktivis por la cerbomorto-organgrefto, estas nur parto el la koncernaj societoj, kiel la "grefta instituto" ĉe la kapo. Ni ŝatus se oni ekscius, ke inter la kuracistoj estas multaj, kiuj prenas la starpunkton pri la grefto ke "absolute ni ĝin ne akceptu!".



Greft-Instituto

Parlamento



Hm...?

Kuracisto

Eĉ inter la medicinlaborantoj, estas multaj kontraŭopinioj, kaj tamen!?



D-7 Mi aŭdis, ke oni en Japanio multe malfruas pri la organgrefto el la cerbomortinto, ol en aliaj landoj; ĉu estas vere tiel?

R Antaŭ ĉio oni devus scii kia faro estas la organgrefto post la cerbomorto. Tio objekte koncernas la vivon de du pacientoj samtempe, kaj por unu el ili oni rompas al la alia la vivon, sekve tio estas kuracmetodo, por kiu oni provas eltranĉi la respektivajn organojn vivaj. Tio estas tre kruela faro por homo cerbomortinta, sekve ne estus troigo diri, ke ĝi estas murdo en la nomo de medicina terapio. Do, ĝi estas ja "terapio" eĉ ne imagebla laŭ la etiko de la ĝisnuna medicino.

Tia estado de medicina kuracado estas, kiam oni referencas la japanan kulturon, religion kaj filozofion, ekstreme malfacila por alkitimiĝi kaj malfacile akceptebla. Do tiom pli, oni povus diri, en Japanio ne iris pozitive la cerbomorta organgrefto. Oni ne povas diri, ke ĝusta estas la kompreno, ke ni, en komparo kun tio en aliaj landoj, tiurilate nur postrestas aŭ pli progresas. Ne imite sekvi la vojon de aliaj landoj, sed mem trovi sian propran vojon per plia studado, ekzemple kuracado per medikamentoj, kaj ankaŭ per ekspluato de artefaritaj organoj ktp., do iri laŭ maniero ne per organgrefto, nome Japanio devas per firmaj paŝoj iri la vojon kiel Japanio, por ke ĝi estu modelo por aliaj landoj.

En Usono, kie oni pozitive faras la grefton, la homaj organoj kaj histoj (ostoj/haŭtoj/angioj) estas, kvazaŭ partoj de maŝino, publike komercataj kiel varoj, ekzemple,

unu gramo da osto kostas 20000 enojn, korvalvo---500000 enojn, el kio konsistas la "greft-industrio". Malfermi la vojon al la organgrefto signifas ankaŭ konduki al "rezervigo de homkorpoj". Ni do devas diri, ke tio estas ja grava demando, kiu koncernas la homan dignon.





Freŝajn organojn al vi!



D-8 Mi aŭdis, ke nuntempe estas multaj, kiuj atendas organgrefton, sed nun, kiam la leĝo aprobiĝis, ĉu tiuj personoj povas ĉiuj ricevi la organgrefton? Cetere, ĉu ne estas problemoj post la grefta operacio?

R Ankoraŭ nun, kiam la leĝo pri organgrefto estas aprobita, ne eblas, ke ĉiuj atendantaj grefton ricevu organon donitan. Ĉar la nombro de organproponantoj (= donantoj) estas, kontraŭ tiu de akceptantoj (= ricevantoj), absolute malsufiĉa. Tiel same estas ankaŭ en aliaj landoj. Unu el la grandaj problemoj de grefta kuracado estas tio, ke ne ĉiuj homoj povas ĝin egale ricevi, nome tio estas neegala aŭ nejusta kuracmetodo. Krome, post la operacio la pacientoj devas suferi rifuzreakcion, kvankam kun diferenco je ties gradoj; plie, por inhibicii tiun rifuzreakcion, oni devas trinkadi "imuninhibicianon" dum la tuta vivo. Inhibicii imunon malfortigas rimarkinde la naturan rezistpovon de la koncerna persono, tiel ke tiu ĉi pli facile ricevas infektan malsanon. Cetere, tia imuninhibiciano estas tre multekosta, kaj ankaŭ laŭ la kostoj oni povas diri, ke la greftan kuracmetodon ne ĉiu povas ricevi.

D⁻⁹ Ĉu surloke de la urĝa kuracbezono oni povas ricevi, same kiel ĝis nun, ĉiujn kuracrimedojn?

R Kiel ĝis nun, por la savo de homa vivo ĉia kuraco devas esti aplikata. Sed, laŭ tio, ke nova "morto" por organgrefto el cerbomorto estas agnoskita, en kazo, kiam la koncerna persono mem ankoraŭ viva konsentis pri "organdono", okazos, ke de iu tempopunkto oni ŝanĝas de la kuraco por vivsavo al procedo por la konservo de organo. Kvankam la "du mortoj" estas agnoskitaj laŭleĝe, tamen surloke de la kuracado mem grade leviĝas ankaŭ voĉo, ke estas strange, ke en la sama stato de cerba morto unu vivas kaj la alia mortis, ke sekve necesas tion unuigi per la cerbomorto. Tiam estus ankaŭ ebleco, ke naskiĝus eĉ etoso, ke oni malfacile povus trankvile priflegi pacienton ĝis ties korbato, ĉar ankaŭ la kurackostoj estos problemoj.

D⁻¹⁰ Kio estas tiel nomata "hipoterma terapio" aplikata por peza lezo ĉe cerbo?

R Temas pri terapio preventi malboniĝon de simptomoj ĉe cerbo per tio, ke oni tenas malalta la temperaturon de paciento kun tiaj gravaj simptomoj, kiuj nepre kondukas ĝis cerbomorto laŭ la ĝisnunaj kondiĉoj. Surloke de medicino multe da homaj vivoj estas savitaj per tiu ĉi terapio. Ĝi estas terapio ekspluatita en Japanio, kaj fierinda mondscale. Ankaŭ en aliaj landoj oni praktikas tiun terapion, sed kun malpli da efektiva rezultato ol en Japanio. Tiu ĉi terapio estis naskita en Japanio ĝuste, ĉar estis rezisto kontraŭ la tendenco agnoski cerbomorton la morto kaj, ĉar ankaŭ kuracistoj ja multe strebadis.

Efektive, la medicino konstante progresas kaj disvolviĝas kaj, kiel tiu ĉi "malalttemperatura terapio" estis ekspluatita, oni ne povas nei eblecon ekspluati en estonteco ankoraŭ novan terapion. Malgraŭ tio leĝe difini, en la nuna tempopunkto, la cerban morton la morto kaj tiel plifruigi la morton de homo, estas granda demando, oni povus diri.

Mi estas
organdonanto

Mi ne estas
organdonanto

Mortinta

Ne mortinta

ne penseblas.

Urĝa kuraco

Surloke de
urĝa kuraco la
du mortoj...



D -11 "DONOR"-kartoj (karto doni sian organon) estas diversmaniere disvastigataj; mia demando estas, kiel oni povas kontraŭigi tion?

R Antaŭ ĉio ni ŝatus peti de ĉiuj klare kompreni, kion esence havas en si la "organgrefto el cerbomorto", kaj decidi, ĉu kunhavi aŭ ne tian karton. Kun kompreno konsenti organproponon el cerbomorto signifas nenion alian ol tiel mem konsenti propravole tranĉi al si la vivon. Kiam oni faras radikan demandon, ĉu io tia estas permesate al homoj, tiam devus nature elveni ankaŭ respondo al tio. Sian korpon, kiu estas donacita nur al ĉiu sola el ni, kaj kiu estas nur unu sola en la mondo, ĉiu traktu kare; kaj por tio, oni neniam kaptu aliajn per, nek lasu sin kaptiĝi de tia, unuavide bela slogano, kiel la "akto de amo, savo por aliulo". Do, oni "neniam estu donanto (organproponanto). Kaj ni deziras forte, ke precipe junuloj bonvolu firme teni en sia koro tiun ĉi aferon. Ĉar estos vi, junaj, kiuj iĝos donantoj de freŝaj organoj.

Tio, ke oni leĝe difinis la morto de homo, la cerban morton, eble kondukas al neo de la ebleco ekspluati novan terapion, kiel tiu "malaltemperatura terapio".

Gravas neniam kaptiĝi de slogano la ŭ d a n t a organondononon "akto de amo".

Ni sciuj bone la esencon de la organgrefto!



Viaj junaj korpoj estas alcelataj.



Ho! Jen kuras junaj, viglaj organoj!

Greftkirurgo

Okazas plilarĝigita interpreto pri cerbomorto.

Ĉu ankaŭ al kriminala juro apliki la cerbomorton?!

---En la direkton, ke "cerbomorto estas la morto de homo"
translime de organgrefto---

La leĝo pri organgrefto, aprobita en oktobro de 1997 koncernis tion, ke oni agnoskas "cerbomorton" la morto de homo nur en la kazo, kiam oni faras organgrefton. Sed ankaŭ koncerne la interpreton pri la morto en la kriminala juro naskiĝas moviĝo, ke sendepende de la organgrefto, do en ĉia okazo cerbomorto estu la morto de homo. Ĉu tio ne estos danĝera antaŭsigno, ke la morto ĉe koro estos forneita kaj de nun iom post iom la cerbomorto estos agnoskita kiel la morto de homo?

La ĵurnalo Kjoto publikigis, en sia matena eldono de la 30-a de decembro 1997, jenan artikolon: { "La leĝo pri organgrefto" estis aprobita en junio, kaj la instancoj justa kaj prokurora en ĝia sekvo ekzamenis, laŭ la starpunkto de kriminala leĝo, interpreton pri leĝoj, kaj dekretoj koncerne al "cerbomorto" kaj ŝajne venis al preskaŭ sama vidpunkto ĝis la 29-a tago, ke "pro la leĝdona historio, koncepto de la leĝo, estas pli prave ne limigi al la organgrefto tion, ke 'cerbomorto estas la morto de homo' ". }

Tiu ĉi artikolo estis laŭkontrakte liverita de komuna novaĵagentejo "Kjodo-Cusin" al diversaj ĵurnaloj, kaj ĝi klare montris, ke estas moviĝo pli larĝe apliki la interpreton ke la "cerbomorto estas la morto de homo" ne sole en la leĝo pri organgrefto, sed ankaŭ en alia leĝo. Kontraŭ tio la religia jurpersono Oomoto, la portanta organizo de Ĵinrui Aizenkai, sendis al la Registaro kaj koncernaj instancoj deziresprimon datitan en la 30-a de januaro de 1998 kaj postulis ĝustan aplikon de la leĝo <vd. sur la paĝo 13>.

Kiel estis videble en la procezo ĝis la aprobiĝo de la leĝo pri organgrefto, la establo de leĝo okazas laŭ alta fakeco kaj en la loko, kien la mano kaj kompreno de la ĝenerala publiko malfacile atingas. Ofte okazas, ke io estas jam ekzistanta fakto, kiam tio estas publikigita.

En la fono de ĉifoj rekonsidero pri la kriminala leĝo videblas la celo nuligi diferencon inter la interpretoj pri la morto laŭ la leĝo pri organgrefto kaj la kriminala leĝo, kaj provi pli glate praktiki organgrefton el cerbomortinto. Se en la kriterioj estas la ĝisnuna morto kun tri signoj <pupildilatiĝo/spirĉeso/korbatĉeso>, oni povas ankaŭ apliki la krimon pri murdo al la organelpreneno el cerbomortinto. Se oni permesus nur la cerbomorton, oni povas certe kreskigi la nombron de cerbomortintoj.

Se oni vidas de la starpunkto, ke "cerbomorto ne estas la morto de homo", la unua moviĝo estas evidente "legalizi murdon" kaj "legalizi vivmalŝaton". Tri jarojn poste <de la aprobiĝo de la leĝo pri organgrefto> oni faros reekzamenon de la leĝo pri organgrefto. Apenaŭ 3 monatojn post la aprobiĝo jam estas tia stato, ni timas do, ke eble la popolo estos alpelita en la situacion, ke en la venontaj tri jaroj la leĝa medio, la socia institucio estos ordigita direkte al tio, ke oni povos pli facile praktiki la cerbomortan organgrefton. Ekstreme granda estos ties danĝereco, oni povas diri.

<Adresita al Ĉefministro de la Kabineto, Ministro pri Justico,
Ĝenerala prokuroro de la plejalta prokurorejo,
estro de Prokurorejo, deputitoj kaj senatanoj de Du ĉambroj>

Religia jurpersono Oomoto
Reprezenta estrarano UEMURA Akira

Deziresprimoj

<...la instancoj justica kaj prokurora, kiuj ekzamenis interpreton pri leĝoj kaj dekretoj koncerne al "cerbomorto", ŝajne venis al preskaŭ sama vidpunkto ĝis la 29a tago, ke "pro la leĝdona historio, koncepto de la leĝo, estas pli prave ne limigi al la organgrefto tion, ke "cerbomorto estas la morto de homo".>

Ĉe la supra raporto en gazeto [Ĵurnalo Kioto: matene 30/12/1997], ni sentas grandan antaŭtimon. Oomoto jam de frue deklaris, ke "cerbomorto ne estas la morto de homo", kaj ankaŭ okaze de la diskuto pri la leĝprojekto pri organgrefto, ni prezentis al la Registaro deziresprimon postulantantan prudentan pritrakton.

Sed bedaŭrinde, en la Parlamento ne okazis sufiĉa diskuto, nek tutnecian konsenton oni ricevis kaj tamen la leĝprojekto kun sukceso trapasis la Du ĉambrojn kaj en junio pasintjare ĝi estis aprobita kiel leĝo proponita de deputitoj.

Koncerne la "cerbomorton" stas reale, ke estas eĉ tia kazo, ke gravedulino en la preskaŭmorta stato akuŝis, ke sekve ĉirkaŭ 60 procentoj de la tuta popolo opinias, ke "ĝi ne ŝajnas morto", "mi ne scias juĝi", tiel ke ĉe ili profunde restas rezista sento kontraŭ la leĝo pri organgrefto. Kaj komencante de sciencistoj, kuracistoj, juristoj, religiistoj, multaj kleruloj havas fortan dubon kontraŭ la "cerbomorto" de siaj respektivaj starpunktoj, tiel stas efektive.

Estas ekstreme bedaŭrinde, ke en tiaj cirkonstancoj la instancoj "justica kaj prokurora" en la pozicioj praktike apliki la leĝon, nun planas efektiviĝi la leĝaplikon laŭ la vidpunkto, ke "cerbomorto estas la morto de homo".

Malgraŭ tio, ke la leĝo pri organgrefto difinis, ke "cerbomorto estas la morto de homo" nur en la kazo, kiam oni viva montris sian volon proponi organon, tamen ĉe efektiva leĝapliko konsideri la "cerbomorton senescepte la morto de homo" devigas nin diri, ke tio estas nerezonebla vidpunkto, al kiu ekstreme mankas konsekveneco. Ĉu tio ne kondukos al tio, ke rezulte la homoj ĉe la instancoj mem atencus la leĝon?

Ni forte timas, ke, se ekzemple tia vidpunkto estos publikigita, tio pli kreskigos la tendencon malŝati la vivon, rigardi nur materie la vivon kaj morton, kaj estiĝos tia rezulto, kiu alportos ruiniĝon de menso kun rimarkinda manko de la religia estetika sentimento. Surloke de la medicina praktiko povus ankaŭ aperi eĉ tia prizorginda situacio, ke laŭ juĝo de kuracistoj pli facile la "plilongiga aranĝo je vivo" estos ĉesigita, aŭ ke oni ne plu daŭrigos la kuracadon akcepteblan por la familianoj de la paciento.

Prenante en plenan konsideron ankoraŭfoje la historion kaj fonon de tio, ke en la procezo ĝis la aprobiĝo de la leĝo pri organgrefto oni ne konstituis la projekton de NAKAJAMA, bonvolu prizorgi la leĝaplikon, tiel ni ĉi tie forte deziras al vi.

"NON! DONOR" - karto rekomendata

Cerba morto ne estas la morto de homo. la vivon donacitan zorgu kare.
Ankaŭ vi kunportu la "karton de nedonanto" !

Karto de nedonanto (originalgranda)

**NON!
DONOR**

"Cerbomorto" ne estas la morto de homo
Mi ne donos organon laŭ la "juĝo pri cerbomorto"

<averso>

subskribo de la posedanto

subskribo de familiano

kontaktadreso () -

Eldono/kontaktadreso:
621-8686 Uĉimaru 1 Aracuka-ĉoŭ Kameoka-si Kĵoto-hu
Ĵinrui-Aizenkai-Konsilio pri vivetika demando
0771-22-9960

<roverso>

Por esprimi vian volon


- 1: Kiam vi decidis vian volon, bonvolu bone konsiliĝi kun viaj familianoj. Kaj bonvolu antaŭe komuniki al la familianoj vian volon, ke vi ne akceptos "juĝon pri cerbomorto", ke vi ne konsentos doni organon, kio premisas "cerbomorton".
- 2: Sufiĉas, se vi bonvolos nur subskribi la karton de nedonanto: ne necesas ĝin registri oficiale. B.v. ĉiam kunporti kune kun stirpermesilo, kreditkarto, k.a. En okazo, kiam la kunporto estas malfacila, b.v.konservi ĝin kune kun asekuratestilo. B.v. ankaŭ informi la familianojn, kie ĝi estas konservata.
- 3: B.v. havigi surkarte subskribon de iu el la kunloĝanataj familianoj (patrrajtigito; edz(in)o; pli ol 20-jarulo). Cetere, manko de subskribo ne malhelpas la elmontron de la volo per tiu ĉi karto.
- 4: Tiu ĉi karto estas por elmontri la volon ne konsenti "juĝon pri cerbomorto", nek "organgrefton post tia juĝo" surbaze de la leĝo pri organgrefto. Sekve, ĝi ne malhelpas krom tio apliki aliajn praktikojn de la medicino.

=Pri "Universala Homama Asocio/ Konsilio pri vivetika demando"=

- Ĵinrui Aizen-kai (Universala Homama Asocio), estas organizo agadi, sendepende de rasoj/ landlimoj/ religioj, por mondopaco kaj ĉies feliĉo, en kunlaboro de la popoloj kun sama deziro. Kun la ĉefa sidejo en Ten'on-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, havas ne sole enlande de Japanio, sed ankaŭ plurloke en la mondo sidejojn/ branĉojn/ kontaktejojn.
- Seimeirinrimondai-Taisakukaigi (Konsilio pri vivetika demando) disvolvas, en la aktiveco de UHA, precipe kaj specife klerigan agadon pri la "vivetiko" kaj la koncernan subtenan agadon.

pri la "karton de nedonanto" b.v. sin turni al

621-8686 Ten'on-kyo Kameoka-si Kyoto-hu
Ĵinrui-Aizenkai-Konsilio pri vivetika demando
Telefono : 0771-22-9960 Fakso : 0771-22-5926



Estu kara la vivo al vi donacita

CHERISH THE LIFE YOU HAVE BEEN GIVEN